ÖNB
+Z65249909

# II. LIBERA PENSO

1908a Jaro. — MARTO. ⁎ 1a Jaro. — 1a Numero.

REDAKTORO :
*Provizora Sekretario de l'Esp. Societo de Liberpensuloj*
R. DESHAYS, Sens (Yonne - Francujo).

## § 1a. — NIA CELO

Servi per konstanta interhelpo la liberpensan propagandon kaj la disvastigon de Esperanto, unuigi la fortojn de la tutmondaj liberpensuloj kaj prezenti al ili en sama lingvo freŝajn, senperajn informojn pri ĉiulandaj okazintaĵoj, kiuj koncernas la liberpensan movadon, tia estas nia celo.

Certe Esperantismo povas, pro sia propra influo kaj logikaj konsekvencoj, esti konsiderata kiel sendependa idealo, memtaŭga por la paca disvolviĝo de l'progreso ; sed ankaŭ Esperanto, kiel oportuna ilo, devas esti alprenata de ĉiuj, kiuj en ia ajn fako laboras por universala utilo.

Inter tiaj entreprenoj en unua vico aperas al ni la liberpensa movado.

Ĉar, se ni eĉ formetas la ideon de Progreso kaj atentas nur la senĉesan aliiĝon de ĉio, kio ekzistas, ni konstatas, ke tiu ŝanĝiĝado estas nepre kondiĉo kaj leĝo de la vivo.

Kia ajn estas la esenco de la homa libereco, ĉu ĝi estas fundamenta, ĉu rilata kaj enkadrigita en universala determinismo, ĉu nia penso estas kaŭzo, ĉu nur efekto, ĉu ambaŭ reciproke, restas ĉiam la fakto, ke niaj ideoj ŝanĝiĝas kun la stato de la socia medio, ke novaj pensoj aperas kiel preparo, akompano kaj sankcio de novaj faroj kaj kutimoj, fine ke tiu iro de la penso ne povas, kaj sekve do ankaŭ ne devas esti haltigata per eksteraj perfortiloj. Penso havas unu bezonon, *liberecon*, sen kiu ĝi ne kreskadas, unu forton, *sincerecon*, sen kiu ĝi ne efikas.

Certe ni ne volas nei, ke, por ke io vivu, io devas daŭradi, ke la senĉese aliigata ekvilibro devas tiam rompiĝi, kiam renovigo jam pretiĝas, ke unuvorte konservemo havas sian necesan rolon ; tamen, ĉar tradicio ĉiam, laŭ inercia

701.801-B.Esp —

Österreichische Nationalbibliothek
Digitale Services

principo, trovas sufiĉe da anoj, ĉar la estinto ĉiam uzas blinde sian akiritan forton kaj senkompate premegas ĉiun unuan ekprovon de ebla postvenontaĵo, ni kredas, ke pioniroj estas neniam tro multaj kaj meritas kuraĝigon.

Liberpensulan doktrinon, kontraŭdogman dogmaron ni nek konas nek akceptos. Lumamantoj, lumigantoj, ni ĉiun homan penson gastigos amike, sed senindulge submetos al provo de l' faktoj science pruvitaj, de l' voloj malkaŝe montritaj. Al ni venu do ĉiuj el la tuta mondo, kiuj sindone penadas kontraŭ ia tiraneco por propra racia penso, por la rajto de l'ideoj. Ili trovos en nia rondo, se ne tuj grandan amason kaj potencan subtenilon, almenaŭ sinceran gefrataron kaj bravajn kunbatalantojn.

La Redaktoro.

## § 2a. — LA SOCIETO (1a Raporto).

### I. — Protokolo

1. — Dum la tria kongreso de Esperanto, en Kembriĝo, la 13an de Aŭgusto 1907 je la tria posttagmeze kunvenis :

| | | |
|---|---|---|
| Sinjoro | Auerbach Robert, | tirolano. |
| » | Bendix Kaj, | dano. |
| » | Beauchamp Pierre, | kanadano. |
| » | Boucon H., | franco. |
| » | Bourlet Carlo, | franco. |
| » | Deshays René, | franco. |
| » | Essigmann Stanislaw, | polo. |
| » | Evstifeieff N. P. | ruso. |
| Sinjorino | » » G. E. | hungarino. |
| Sinjoro | Blangarin, | franco. |
| Fraŭlino | Fryer Helen, | anglino. |
| Sinjoro | Humberset Paŭlo, | sviso. |
| » | Kühnl Eduard, | bohemo. |
| » | Marechal F. L. G., | anglo. |
| » | Moch Gaston, | franco. |
| » | Padfield W. W., | anglo. |
| » | Papillon C., | franco. |
| Fraŭlino | Rouf Françoise, | francino. |
| Sinjoro | Stroele Georges, | sviso. |
| » | Thiedemann R., | anglo. |

| | | |
|---|---|---|
| Fraŭlino | Vaucher Marguerite, | svisino. |
| Sinjoro | Watters Frank, | anglo. |
| » | Wolf Jules, | sviso. |
| » | Zinovjev A., | ruso. |

S-ro Wolf malfermis la kunsidon per la jenaj paroloj :

« Karaj Gesamideanoj,

« Kiel vi povis ekvidi jam el la provizora programo de la tria kongreso, la religiaj esperantistoj kunvenas en diversaj specialaj kunvenoj : Diservo katolika — Diservo angleklezia — Diservo nekonformista — Diservo en la Emmanuel kongregacia preĝejo — Kunveno por la traduko de la Biblio, k.t.p.

« *Tial* mi pensis, ke estus dezirinda, ke la esperantistaj liberpensuloj *ankaŭ* havu sian specialan kunvenon, unue por konatigi al la riprezentantoj de ĉiuj nacioj, al la tuta esperantistaro, ke Liberpenso ekzistas *ankaŭ* en Esperantujo kaj havas anojn en la kongreso, poste por interparoli inter liberspensuloj diversnaciaj pri la plej bonaj rimedoj helpi al la disvastigado de niaj du amataj aferoj, Liberpensado kaj Esperanto : tio estas — kiel povas Esperanto helpi la propagandon por Liberpensado, kaj kiel povas Liberpensado helpi la propagandon por Esperanto. Pri tiu temo mi alportas la jenan leteron de la Federacio Svisa de Liberpensuloj.

« Antaŭ ol malfermi la diskutadon mi diras al vi, ke S-ro Bourlet, kiu intencis ĉeesti kaj prezidi nian kunvenon, estas malhelpata de la kunveno de la Scienca Asocio, kiu okazas je tiu ĉi horo en alia loko. »

Tiam S-ro Stroele legas tradukon de la letero, en kiu la Svisa Federacio de Liberpensuloj petas la ĉiulandajn Liberpensulojn, kunvenintajn en Kembriĝo, ke ili subtenu la proponon, kiun la svisa delegito ĉe la Liberpensa Kongreso en Praha prezentos por la akcepto de Esperanto, kiel helpa lingvo en la diskutadoj de la Internaciaj Kongresoj de Libera Penso kaj en la korespondadoj de la Centra Oficejo de la Internacia Federacio Liberpensa.

Tiu propono estas unuvoĉe akceptita.

Poste S-ro Moch klarigas la neceson, unuanime sentatan de la ĉeestantoj, fondi esperantistan societon de Liberpensuloj. La Katolikoj havas sian esperantan societon kun interesa

revuo, kaj uzas ilin por ataki la liberpensajn ideojn kaj la kontraŭklerikan politikon : neniu esperantista voĉo respondas. En la kongreso multaj penoj estis necesaj por ke la Diservoj enskribiĝu sur la programo ne tute kiel oficialaĵoj. Kaj pli ĝenerale, oftaj faktoj pruvas ke, eĉ inter Esperantistoj, oni ankoraŭ ne kutimas respekti la liberecon de l'aliaj pri esprimo de opinioj.

Oni aprobas unuvoĉe. Post interŝanĝo de ideoj laŭ sama senco, oni decidas ree kunveni dum la kongreso.

2. — En tiu dua kunveno, la 15an je la naŭa matene, nur malmultaj povis ĉeesti.

S-ro Bourlet parolis pri la urĝeco starigi tuj la societon kaj eldoni la bultenon kiel eble plej baldaŭ.

S-ro G. Stroele estis komisiata kun S-roj Deshays kaj Evstifeieff por redakti la leteron al la Internacia Kongreso de Libera Penso en Praha.

Pri la bulteno, S-ro Deshays akceptis esti provizora sekretario.

Pro manko de tempo, neniu kunsido plu okazis.

3. — Oficiale estis komunikata al la estraro de l'kongreso la jena informo :

La Liberpensuloj, kunvenintaj dum la tria kongreso de Esperanto en Kembriĝo, decidis :

1e Subteni la proponon farotan de la Svisa Federacio de Liberpensuloj ĉe la proksima liberpensa kongreso en Praha (Prago) por enkonduki Esperanton, kiel oficialan helpan lingvon ĉe la kongresoj internaciaj de Libera Penso kaj por la komunikoj de la centra komitato ;

2e Fondi kiel eble plej baldaŭ Internacian Esperantistan Societon de Liberpensuloj, kies celo estas propagandi Esperanton inter la Liberpensuloj, kaj Liberpenson inter la Esperantistoj.

## II. — Nia agado en 1907.

1. *Esperanto ĉe la Liberpensa Kongreso* (8-12 sept.) — En tiu plej proksima, tro proksima parto de nia duobla agado,

ni tute malsukcesis, pro manko de tempo por prepari metodan kunagon de diversnaciaj samideanoj, por prepari ankaŭ favoran akcepton de novajo ĉe la estroj. Vane la bohemaj Esperantistoj skribis leteron al la Kongreso, vane klopodis niaj amikoj S-roj Kühnl, Fridrich kaj la loka Sekretario mem S-ro Karel Pelant : la estraro rifuzis legi kaj aŭskulti ion ajn pri Esperanto. Tamen en oficiala protokolo oni povas ja vidi plendojn pri la malhelpoj truditaj per la diverseco de lingvoj.

La venonta internacia kongreso de Liberpensuloj okazos en Bruselo 1910 : tiam espereble ni estos fortaj kaj... lertaj. Ni penos por ke la estroj faru mem nian proponon. Jam S-ro Karel Pelant akceptis fariĝi honora membro de nia societo, kaj varbis al Esperanto S-ron Raphael Rens, anon de l'internacia sekretariejo.

II. *Propagando de Libera Penso ĉe la Esperantistoj.* — Alvoko estas sendita al ĉiuj esperantistaj grupoj kaj informo komunikata al la propagandaj esperantistaj gazetoj. Kelkaj aliĝoj alvenis. Ni ne devas miri pri la malrapideco de la sukceso, ĉar ne facila estas tia varbado. La plimulto eĉ de la Esperantistoj estas pri religia demando timemaj aŭ indiferentaj ; kelkaj komprenas la neŭtralecon, kiel forjeton de ĉiu novajo : iuj ankaŭ juĝas, ke Esperanto ne estas sufiĉe potenca por riski danĝerajn atakojn aŭ atakiĝojn ; kaj efektive singardo estas necesa : en multaj urboj nur la persona propagando estas ebla kaj utila. Sed bonajn esperojn donis al ni sindonaj anoj en kelkaj urboj.

*Adresoj de la Fondintoj :*

1. S-ro Robert Auerbach, Eppan (Tirolo).
2. » K. Bendix, Kopenhago (Danujo).
3. » Beauchamp, Quebec (Kanadujo).
4. » Boucon, profesoro en Annecy (Francujo).
5. » Carlo Bourlet, 22, av. de l'Observatoire, Paris (Fr.).
6. S-ro R. Deshays, profesoro en Sens, Yonne (Francujo).
7. » Essigmann, Marŝalkovska, Varsovio (Polujo).
8. S-ro - S-ino Evstifeieff, 3, avenue de Lancy, Genève (Sv.).
9. S-ro Blangarin (Francujo). [London S. W.
10. F-ino Helen Fryer, 39, Calais Gate Camberwell Park,

11. S-ro Paul Humberset, Progrès, 27, Le Locle (Svisujo).
12. » Eduard Künhl, 313, Praha II (Bohemujo)
13. » Gaston Moch, 26, rue de Chartres,
Neuilly-s.-S. (Francujo).
14. » F.-L.-G. Maréchal, 12, Eldon Place, Leeds (Angl.).
15. » W.-W. Padfield, 22, Murray Road, Ipswich (Angl.).
16. » Papillon, 27, avenue Harmonie,
Bobigny, Seine (Francujo).
17. F-ino F. Rouff, 4, boul. Madeleine, Beaune (Francujo)
18. S-ro Georges Strœle, 4, Orangerie, Neuchâtel (Svisujo).
19. » Thiedemann, 687, Holderness Road, Hull (Anglujo).
20. F-ino Marguerite Vaucher, Progrès, 57,
La Chaux-de-Fonds (Svisujo).
21. S-ro Frank Watters, 46, B. Hackford Rd,
London S. W. (Anglujo).
22. » Jules Wolf, fabrique Auréole,
La Chaux-de-Fonds (Svisujo).
23. » A. Zinovjev, Grand-Lancy, Genève (Svisujo).

### III. **Nia stato : 31 Decembro 1907.**

*Aligoj ricevitaj, krom la fondintoj :*

ANGLUJO

24. S-ro Alec, A.-S., Burnley, Elm St., 98.
25. » Hartley, J.-W., Burnley, Lubbock St., 24.
26. » Taylor, James, Burnley, Balduin St., 12.

AUSTRUJO

27. » Felser, R., Graz, Klosterwieg, 46.

FINLANDO

28. » Mattson, K.-Aug., apoteko de Willems, Helsingfors.

FRANCUJO

29. S-ro Cayeux, R., Instruisto, Sotteville-les-Rouen.
30. » Cornet, Lucien. Députato, urbestro, Sens.
31. F-ino Dupays, M., Instruistino, Crévic (M.-et-Moselle).
32. » Dugourd, M., instr., rue Cuvier, 22, Montbéliard.
33. S-roj Frechas, A., 3, rue Sophie-Gexmain, Paris.
34. » Laisant, A., 162, av. Victor-Hugo, Paris.
35. » Maillard, J., Fontaine-Simon (Eure-et-L.).
36. » Meunier, E., Senonches (Eure-et-Loire).
37. » Do Roux, 10, place Bisson, Lorient.

HISPANUJO

38. S-ro Burgos, M., Admon de Hda, Tarragona.

ITALUJO

39. S-ro Castoldi, Eligio, teatristo, Rho.

*Abonoj de la Bulteno :*

Davidov Georg, Saratov, Rusujo.

Section de la Ligue des Droits de l'Homme, Sens (Francujo).

*Mono ricevita :*

| | | | |
|---|---|---|---|
| En Kembriĝo de S-ro | Bourlet 10 ŝil. | | |
| | Wolf 4 ŝil. | = Fr. | 17.50 |
| Poste de S-ro | Watters | | 2.50 |
| » | Boucon | | 2.50 |
| F-ino | Vaucher | | 2.50 |
| S-ro | Moch | | 2.50 |
| » | Padfield | | 2.50 |
| » | Zinovjev | | 2.50 |
| » | Deshays | | .50 |
| » | Cayeux | | 2.50 |
| » | Fréchas | | 5.— |
| » | Mattson | | 2.40 |
| F-ino | Dugourd | | 2.50 |
| S-ro | Hartley | | |
| » | Taylor | | 7.55 |
| » | Alec | | |
| » | Maillard | | 2.50 |
| » | Meunier | | 2.50 |
| | | Sumo | 59.95 |

*Kaso.*

Elspezoj :

| | |
|---|---|
| 20 N-roj de la ĵurnalo *L'Action* kun nia alvoko en Franca lingvo | 1.— |
| Papero kaj kovertoj | 4.15 |
| Poŝtmarkoj | 10.25 |
| Alvoko : 500 fol. (300 esper. + 200 franc.) | 20.85 |
| Sendo de l'alvokoj | 15.— |
| Ĥemia papero | 0.25 |
| Abono de la ĵurnalo *L'Action* ĝis 31 januaro 1908 | 4.50 |
| Sumo | 56.— |

En kaso 59,95 — 56.— = 3.95

## Januaro 1908

*Aligoj ricevitaj :*

FRANCUJO

40. S-ro G. Burlotte, Paris, 55, rue Lepic.
41. » L. Reiss, Paris, 50, rue de Paradis.
42. » Do Rapine, Marseille, 4, place Sadi-Carnot.
43. » E. Coppenet, Beaune, Ecole comm. de filles.
44. » Galland, Beaune, faubourg Madeleine.
45. » Gerbaut, Beaune, Montagne des Marconnets.
46. » L. Madon, Beaune, avenue de la République.
47. F-ino Melet, Beaune, prof. coll. de J. F.
48. S-ro J.-B. Menneveau, Beaune, 4, boul. Madeleine.
49. » Monjard, Beaune, faubourg Perpreuil.
50. S-ino Montaron, Beaune, directr. coll. de J. F.
51. S-ro Nuidant fils, Beaune, Savigny-les-Beaune.
52. F-ino Ricaud, Beaune, faubourg St-Nicolas.
53. S-ro Wurmser, Beaune, 12, rue de la Charité.

GERMANUJO

54. S-ino Marie Hankel, Dresden, Nikolaistr.

RUSUJO

55. S-ro A.-N. Vasiljev, Voronej, esp. oficejo.

SVISUJO

56. S-ro J. Forestier, Genève, 23, av. Pictet-de-Rochemont.
57. S-ino E. Schlatter, Trogen (Appenzel), instr.

*Mono ricevita :*

| | | |
|---|---|---|
| | Transportite Fr. | 3.95 |
| Kotizaĵoj : | | |
| de F-ino Rouff | . . . . . . . . . . . . . . . | 2.50 |
| » S-ro Stroele | . . . . . . . . . . . . . . . | 2.40 |
| » » Burlotte | . . . . . . . . . . . . . . . | 2.50 |
| » » Rapine | . . . . . . . . . . . . . . . | 2.50 |
| » » Reiss | . . . . . . . . . . . . . . . | 2.50 |
| » » Forestier | . . . . . . . . . . . . . . . | 2.90 |
| » » Coppenet | . . . . . . . . . . . . . . . | 2.50 |
| » » Galland | . . . . . . . . . . . . . . . | 2.50 |
| » » Gerbaut | . . . . . . . . . . . . . . . | 2.50 |
| » » Madon | . . . . . . . . . . . . . . . | 2.50 |
| | | 25.30 |

| | | |
|---|---|---|
| | Transportite. Fr. | 25 20 |
| » F-ino Melet | . . . . . . . . . . . . . . . . . . | 2.50 |
| » S-ro Menneveau | . . . . . . . . . . . . . . . . . | 2.50 |
| » » Monjard | . . . . . . . . . . . . . . . . . . | 2.50 |
| » S-ino Montaron | . . . . . . . . . . . . . . . . | 2.50 |
| » S-ro Nuidant | . . . . . . . . . . . . . . . . . . | 2.50 |
| » » Ricaud | . . . . . . . . . . . . . . . . . . | 2.50 |
| » » Wurmser | . . . . . . . . . . . . . . . . . | 2.50 |
| | Sumo | 46.75 |

*Kaso :*

Elspezoj :

| | | |
|---|---|---|
| poŝtmarkoj Fr. 2.— | | 2. — |
| Finmonate : Restas. . . . . . | | 44.75 |

Kiel oni vidas, ne malkontentige komenciĝis la jaro por nia juna societo. En unu sola urbeto, Beaune (Francujo), nia sindona kunfondintino, F-ino Rouff, varbis sufiĉe da anoj por starigi, se ne jam lokan grupeton, almenaŭ vivantan anaron kaj kuraĝigan ekzemplon.

Aliparte, tre agema kaj influa franca ĉefliberpensulo, S-ro eksdeputato Hubbard, vicprezidanto de la « Association Nationale », malfermis al ni rubrikon en la gazeto « La Pensée Libre » kaj promesis veni en Dresden por partropreni nian feston kaj helpi nian propagandon.

## IV. — Niaj projektoj.

I. *Organizo.* — Regularon de nun ni devas prepari. Ĉiuj anoj sendu proponojn, el kiuj la provizora sekretario aranĝos projekton prezentotan ĉe nia kunveno dum la Kongreso en Dresden ; tiu projekto estos presata en la bulteno kelkajn monatojn antaŭe por ke ĉiu povu ekzameni ĝin kaj, se li ne venos en Dresden, skribe ĝin subteni aŭ reformi.

Ankaŭ Komitaton en Dresdeno ni starigos, akceptante kompreneble skribajn voĉdonojn de anoj ne ĉeestontaj. Redakcion de l'Bulteno por la oficiala parto ni devos elekti laŭ sama maniero, kaj ankaŭ, se ŝajnas necese, oficialan korespondanton el ĉiu lando.

II. *Agado.* — Ankaŭ por nia propagando ni devos lerte

kaj energie profiti tiun kongreson baldaŭan. Pri liberpensa festo ne pli ne malpli oficiala ol la diversaj Diservoj ni atendas de D-ro Mybs principan respondon : de la venonta monato ni komencos do aranĝi vere efikan elmontron, ne atakan, ne brueman, sed allogan por scivoluloj, interesan por artamantoj, instruan por indiferentuloj. Kaj grandan helpon ni trovos en kolegino nia, S-ino Hankel, membro de l'Kvaro por la Kvara.

Ĉe la liberpensula flanko, nia granda ambicio nepre estas imiti la Pacifistojn kaj alprenigi Esperanton en Internaciaj Kongresoj. Por tio, malgraŭ la malsukceso en Praha, ne mirinda pro la improviziteco de la entrepreno, ni havas ja tempon kaj rimedojn. Ni konigu nin unue ĉe lokaj rondoj, kiuj nin rekomendos al naciaj societoj; eĉ unu sola varbito estos ekzemplo al aliaj kaj helpo al la internacia federacio, en kies konstanta sekretariejo estas Esperantistiĝanto, S-ro Raphael Rens. Ni do nun bone esperu, t. e. plu laboru !

## V. — **Nia Bulteno.**

Ĉiumonatan presigon kaj sendadon de 4-paĝa bulteno prenis sur sin nia kolego N. P. Evstifeieff en Ĝenevo ; ni repagos al li la koston nur kiam ne estos malopортune por la societo, aŭ kiam ni deziros obligi la disponatan unuon de amplekso. Kaj tial ni povis postuli de niaj anoj nur malaltan kotizajon (provizore, kiel estas nun ĉio ĝis la Dresdena kunveno), kaj tial povas aperi ĉi tiu prova bulteno : por retrovi rajton ne uzitajn dum la antaŭaj monatoj pro la malmulteco de aliĝoj, ni ricevas nun larĝan amplekson.

La Bulteno enhavos, laŭ propono de S-ro Evstifeieff, oficialan parton por informoj rilataj al la societo, komunikojn de l'korespondantoj, kronikon pri gravaj faktoj de l'monato de la liberpenso vidpunkto, kaj parton ne oficialan por artikoloj de anoj, tradukoj aŭ kritikoj.

Por efektivigi tiun planon, devas de nun ĉiu membro fariĝi korespondanto ; ne per represo de informoj suferintaj longan rondiradon, ne per frazoj kopiitaj el diplomatemaj raportoj ni vivigos nian bulteneton kaj servos nian aferon, sed per diskonigo de tipaj faktoj memviditaj, per precizaj statistikoj malvaste limigitaj, per ideoj mempersonaj, per proponoj tuj realigeblaj en komenco de agado.

*Do konstantan enketon ni starigas pri la reala libereco de l'opinioj en ĉiuj landoj kontraŭ la dogmoj aŭ pensokutimoj subtenataj de la eklezioj, de la ŝtatoj, kaj de ĉiuj eksteraj potencoj.* Multaj respondoj alvenu por la venonta numero !

Literaturan aldonon ni ne povas nun regule eldoni ; tamen estas tasko nia, plej bela kaj plej necesa, internaciigi per Esperanto la geniajn paĝojn de ĉiulingvaj verkistoj pri la libera pensado. Entreprenu ni publikigi liberpensan libraron, aŭ komence almenaŭ liberpensan antologion : ĉiu el ni, kiu volos kunlabori, elektu tradukotajon kaj nin informu pri ĝi.

Estu ĉi tiu bulteno vere opa kunligilo, alloga por sinceruloj !

La Sekretario.

## § 3a. — KRONIKO TUTMONDA de L. P.

Okazis en 1907 la Kongreso de Bohemaj liberpensuloj en Nordameriko, kaj la Internacia Kongreso de liberpensuloj en Praha : du atestoj de l'agemeco de niaj bohemaj amikoj.

Ĉe la unua (Chicago - Aprilo), riprezentinta 90.000 federacianojn, fariĝis pripensiga diskutado, konkludita per du decidoj iom kontraŭdiraj, inter la defendantoj de nur filozofa agado kaj la subtenantoj de l' plilarĝigo sur politikan kaj socian kampon. En la dua — la nia ! kiel ni povas diri kun malĝoja ironio — (7-12 Sept.) la ĉefaj temoj elokvente priparolitaj estis la neŭtraleco de l'lernejoj, la disigo de l'eklezioj kaj ŝtatoj, la patriotismo ; en la lasta parto oni ŝajnis serĉi precipe ne klarigon de l'rilatoj inter patriota sento kaj pensa nedependeco, sed starigon de ia komuna ideo oficiale liberpensula pri tiu demando. Ni alifoje ekzamenos la metodojn.

Fakto eĉ pli grava, pro popola karaktero, ol kongresoj mem, estas la manifestado en Romo (20 Sept.) ĉe la Kapitolio por honori la martirojn de la Roma Respubliko en 1849 kaj de la Libera penso : en entuziasma lando pli profunda estis la entuziasmo, miksata kun indignego pro kongregaciaj skandaloj.

En Novembro (1-3) sian kongreson havis ankaŭ la Franca

Nacia Federacio en Parizo ; ĝi alprenis interesajn decidojn kaj deziresprimojn pri laikaj festoj anstataŭontaj (kiam ?) la religiajn ceremoniojn, pri civita edukado, pri la libereco de l'opinioj malrespektita en kondamno de sindikatistoj kaj antimilitaristoj ; ĝi klopodis, ne senpene, por prepari unuiĝon de l'du francaj societoj : la « Fédération Française » mem kaj la « Association Nationale ».

En la franca politiko disvolviĝadas la sekvoj de la « Disigo ». La 21ªⁿ de Decembro la Ĉambro de l'Deputatoj balotis post longa batalo, sed per granda plimulto, la leĝon de Devolucio de l'eklezaj bienoj, kiu malhelpas senfinajn procesojn kaj donas al la malriĉuloj ilian parton de la Diamaj trezoroj.

Fine en Januaro la ministro de l'Publika Instruado favore akceptis peton de la « Grupo por raciistaj studoj » (Groupe d'Etudes Rationalistes), inter kies delegitoj estis ano nia S-ro Laisant, por enkonduko de Historio de la Religioj en la Superan Instruadon.

Ni nur rememorigu la legantojn pri la modernisma movado, kiun oni povas nomi pastra ekliberpensado : pri ĝi, kiel pri la franca « disigo », la sincera obstineco de la Papo konservis antaŭ la publika opiniantaro la klarecon de l'demando kaj faris potencan servon al la liberpensa progreso.

Kaj precipe rememoru ĉiuj niaj geamikoj, ke malgraŭ la progreso, Libera Penso suferas en la preskaŭ tuta mondo la subpremon de l'registoj, kiuj komprenas ĝian forton renoviĝan, kaj la venenvundojn de maltrankvila pastraro, kiu sentas ja la finon de sia spirita reĝeco, kaj provas lastan batalon.

R. D.

---

## § 4ª. — LA SOCIETO (2ª Raporto)

### Februaro

*Novaj aliĝoj :*

BRAZILUJO

58. S-ro Jan Hempel, maréchal Mallet, Parana.

FINLANDO

59. S-ro A. Korpelainen, kontoristo, Kemi.
60. » K.-P. Lahdenpera, kasisto, Kemi.

FRANCUJO

61. S-ro D° Fromageot, 2, rue de l'Hôtel-Dieu, Beaune.
62. » Coquengniot, faubourg Madeleine, Beaune.
63. » D° Saquet, 25, rue de la Poissonnerie, Nantes.

HISPANUJO

64. S-ro Victorino Aparici, Esp. Konsulo,
Pi-y-Margall, 7, Castellon.

*Mono ricevita :*

| | | |
|---|---|---|
| de S-ro | Korpelainen . . . . . . . . . . . . . . . . | 2.40 |
| » » | Lahdenpera . . . . . . . . . . . . . . . | 2.40 |
| » » | Coquengniot . . . . . . . . . . . . . . . | 2.50 |
| » » | Fromageot . . . . . . . . . . . . . . . | 2.50 |
| » » | Keller . . . . . . . . . . . . . . . . . | 2.50 |
| » » | Saquet . . . . . . . . . . . . . . . . . | 2.— |
| | | 14.30 |
| | Transportite Fr. | 44.75 |
| | | 59.05 |

*Elspezoj :*

| | |
|---|---|
| Ses monata abono de « La Pensée Libre » . . . . . . | 2.— |
| 1ª leterpapero, poŝtmarkoj k. sim.. . . . . . . . . . | 2.10 |
| | 4.10 |
| En kaso . . . . . . . . . | 54.95 |

La Sekretario.

## § 5ª. — NEOFICIALA PARTO

Oni memoros, ke en tiu ĉi parto de l'bulteno la artikoloj estas personaj kaj ke la societo prenas nenian respondecon pri ili. Kaj precipe pri la jena (§ 6ª), kvankam ĝi koncernas la agadon de la societo, oni estas fervore petataj sendi jesajn aŭ neajn rimarkojn. La Redaktoro.

## § 6ª. — NIA VOJO.

Du demandoj staras antaŭ liberpensa societo, difinanta sian agadon, la unua pri amplekso kaj la dua pri metodo.

1. Ĉu ni tenos nin en la limoj de l'teoria pensado, tio estas en la religiaj kaj filozofiaj diskutoj kaj en la propagando de l'reformoj, kiuj nur ilin koncernas — aŭ portos la batalon

sur ĉiun kampon, kaj subtenos la liberecon de l'penso pri politikaj, sociaj, ekonomiaj demandoj ?

2. Ĉu ni, are kaj oficiale, ekzamenos funde la problemojn kaj alprenos solvon montritan de la plimulto — aŭ, rizervante la opiniojn de ĉia membro, konsentos por restadi ĉe forme libereca vidpunkto, kaj por doni nian helpon senpartie al ĉiu homo, al ĉiu grupo perfortata en esprimado de ideoj ?

Antaŭ ol klarigi, kiel mi komprenas nian rolon rilate al tiuj du demandoj, mi konsideros, kio efektive okazas ĉe la plej multaj societoj.

En la ĵusa kongreso de l'amerikaj bohemaj liberpensuloj en Chicago, la unua demando estis traktata, kaj el fervoraj malkonsentoj rezultis duobla kaj memkontraŭdira konkludo : per baloto estis ambaŭe alprenataj unue la propono de l' prezidanto Iska por limigo en « religia liberpenso kaj intelekta kulturo » — due la propono de l'eŭropa delegito Bartosek por « batalo kontraŭ ĉiuj supertiĉoj en sferoj nacia, ekonomia, socia kaj politika ». S-ro Iska estis prave timinta disiĝon kaj malpacon en la federacio sur la danĝera kampo de l' partioj kaj klasaj konkuroj ; S-ro Bartosek estis ĝuste pruvinta, ke la ĉefe interesaj demandoj kaj urĝaj reformoj ne estas la abstrakte filozofiaj.

Kaj multaj societoj tiel solvas la malfacilecon, aŭ por pli vere diri, ĝin tiel tute ne solvas. La kaŭzo estas, ke la plej multo de iliaj anoj, konsentante pri kontraŭreligia agado, imagas, ke sur aliaj kampoj ili devus ankaŭ konsenti pri preciza politiko : ili forgesas, ke kontraŭ religiaj dogm altrudoj ili batalas ja nur por spirita sendependeco, kaj ke tia ligo ne postulas komunecon de pozitivaj ideoj. Tiel do la limigon de l'amplekso necesigis la neklareco de l'metodo.

Tiu ĉi dua demando efektive ne ŝajnas esti sufiĉe pripensita de multaj liberpensuloj. En grupoj kaj en kongresoj, jen ili laboras per gravaj studoj kaj kuraĝaj ekzemploj por simpla penslibereco, rekomendante neniun sistemon, alprenante neniun formulon ; jen ili difinas (memoru iujn oratorojn en Praha) opinion pri paco aŭ patriotismo kiel liberpensan opinion, kiun ĉiuj devas propagandi. Kelkaj ŝajnas ja konsideri, ke liberpensa grupo kaj despli vere tutmonda L. P. kongreso, estante riprezentanto de l'Racio, havas la rajton, eĉ la devon ekzameni, trakti, solvi ĉiutemajn demandojn, kaj pri ĉio diri

sian vorton, la lastan. Fakte, ĉar opinioj pri politika kaj ekonomia agado dependas ne nur de abstraktaj ideoj, sed de karakteroj kaj precipe situacioj, ĉar la plej multaj liberpensuloj estas inteligentuloj el meze riĉa burĝaro, liberpensaj, aŭ pli ĝuste liberpensulaj opinioj estas progresema, sed ne revolucia programo.

Nu, reprenu ni la du demandojn : serĉu ni respondon plej logikan, plej sinceran kaj plej oportunan por nia internacia societo.

Kial ni grupiĝis en Kembriĝo ? precize tial ke, okaze de la religiaj Diservoj, ni sentis bezonon kaj devon elmontri la ekziston ĉe la Esperantistaro de diferencaj opinioj, kaj postulante por ili saman rajton kaj kvazaŭ oficialecon, ĉesigi privilegion kaj moralan superpremon. Ĉu iu inter ni eĉ aludis sian propran kredon aŭ nekredon ? ĉu aŭdiĝis unu vorto pri filozofia sistemo ? nur tiu titolo nin kunigis — *liberpensuloj*, nur tiu ambicio nin kondukis — *sendependeco*. Ni sciis, ke ĉiu penso libera estas nepre individua, originala, ke ideoj tute samaj estas ĉiam alprenitaj, ne pensataj, estas tranĉitaj, velkintaj, estas vortoj, ne ideoj ; ni sciis, ke nur tiuj postulas pensunuecon, kiuj mortigas la pensojn. Kaj ĉiutage pli necese, ĉar ni jam kvarobliĝis, ĉar ni ĉien etendiĝos, estos ebla nur forma kaj morala unueco : la diversaj popoloj staras, sur la kruta vojo al libereco, ĉe multaj ŝtupoj kaj ĉe malsamaj etaĝoj ; la nivelo ne estas egala, la stato ne estas sama, sed la movo, sed la iro penas laŭ sama direkto. Jen do nia unueco kaj nia propra ligilo, jen nia bona metodo : pensu vi, kion vi volos ; se vi sincere diskutos, se vi ne altrudos vian penson per forto, per subaĉeto, per materia kutimigo ĉe nekonsciaj infanoj, ni vin akceptas kaj defendos.

Ne diru al mi, ke, se ni ricevos en la societon eĉ katolikon, eĉ pastron, ĉiuj ceteraj forkuros : kun tiu kondiĉo, *sincereco*, kun tiuj rimedoj, *racio kaj historio*, ni povos nenion timi ; kaj *ne kondamnante religion, kiel opiniaron, ni atakos ekleziojn, kiel aŭtoritatojn.*

La du partoj de l'bulteno, kiel la du roloj de la societo, estos klare kaj zorge disigitaj : en la oficiala parto ni traktos nur la komunajn aferojn, t. e. la batalon por la libereco ; en la neoficiala ni donos ekzemplon de liberama diskutado, en kiu ĉiu el ni nur persone parolos.

Restas al ni alia demando : sur kiu kampo speciale ni defendos liberecon, kaj pri kiuj temoj ni akceptos diskutadon?

Nu, se ni forjetas la ideon de « komuna opinio », se ni absolute rifuzas akcepti « pensunuecon », kia malfacileco povas aperi, kiu disiĝo povas okazi? Ni scias, ke oni malpacas pri justo eĉ pli fervore ol pri vero, ke diferenco de potenco kaj riĉeco naskas eĉ pli kruelan malamon ol diferenco de kredo : sed ni konstatas, ke multaj logikaj kaj faktaj rilatoj intermiksas la religiajn, politikajn, sociajn aferojn ; ni komprenas, ke sur la plej danĝeran kampon estas plej urĝe alporti klarecon kaj lojalecon ; ni sentas, ke « limigita » toleremeco estus ĝuste tiel ŝatinda, kiel « limigita » sincereco.

Ĉie, kie naskiĝas ideo, tie estas nia kampo ; ĉiam, kiam ideon minacas perforto aŭ sufokado, tiam komencas nia tasko. Batali ne nur por libera penso, sed por ĉiuj liberaj pensoj, jen estas nia vera programo. R. Deshays.

---

## § 7a. — LA SOCIETO (3a Raporto).

### Marto

*Novaj aliĝoj* :

65. S-ro Jac. Keller, kolonio Eden, 3, Havelstr., Oranienburg (Germanujo).
66. » F. Matuszewski, str. Al. Szucha, 19, Varsovio (Polujo).
67. » A. Dublange, farmaciisto, Le Fileux (Dordogne), (Fra.)
68. » J. Petrbok, en Kojetice apud Praha (Bohemujo).
69. » Generalo H. Sebert, 14, rue Brémontier, Parizo.

*Mono ricevita* :

| | |
|---|---|
| de S-ro Dublange | 2.50 |
| » » Petrbok | 0.90 |
| » » G-lo Sebert | 2·50 |
| » » Matuszewski | 2.90 |
| Sume | 8.80 |
| Transportite | 54.90 |
| | 63.75 |
| Anonco en L. I., kun poŝtelsprezoj | 5.15 |
| En kaso | 58.60 |

La Sekretario.